

La Kalumeto

la bulteno de “Projekto Indiĝenaj Popoloj »
aprilo-junio 2009

« Projekto Indiĝenaj Popoloj » celas prezenti Esperanton al indiĝenaj popoloj tra la mondo kaj faciligi komunikadon inter indiĝenaj popoloj kaj individuoj per Esperanto. Ĝi celas ankaŭ informi esperantistojn pri la situacioj de indiĝenaj popoloj kaj pri kiel popoloj indiĝenaj kaj ne-indiĝenaj povas interagi. Ni kredas ke indiĝenaj popoloj ofte alfrontas similajn situaciojn, exemple: perdoj de terenoj, mondoperceptoj, kaj tradicioj. Ni plu kredas ke komunikado, per Esperanto aŭ alimaniere, helpas indiĝenojn subteni unu la alian kaj pli bone diskonigi siajn kulturojn. Samtempe, PIP komprenas ke multaj indiĝenaj grupoj sentas profundan bezonon revivigi, gardi, kaj antaŭenigi siajn proprajn lingvojn.

Celoj por “Edukado por Ĉiuj”

(starigitaj de Unesko por la programo “Edukado por Ĉiuj”)

--Pligrandigi kaj plibonigi la ampleksan prizorgadon kaj edukadon de junaj infanoj, precipe de la plej vundeblaj kaj malprivilegiaj infanoj.

---Certigi ke antaŭ 2015, ĉiuj infanoj, precipe knabinoj, infanoj en malfacilaj cirkonstancoj, kaj tiuj apartenantaj al etnaj minoritatoj povas aliri kaj kompletigi devigan kaj bonkvalitan elementan edukadon.

---Certigi ke la lernaj bezonoj de ĉiuj junuloj kaj plenkreskuloj plenumiĝas per justa aliro al taŭgaj programoj de lernado kaj vivolerteco.

Atingi antaŭ 2015 kvindek-procentan plibonigon de niveloj de legipoveco inter plenkreskuloj, precipe virinoj, kaj justan aliron al baza kaj daŭra edukado por ĉiuj plenkreskuloj.

---Atingi egalecon inter la seksoj pri edukado antaŭ 2015, ekfokusiĝanta je certigado de plena kaj egala atingo de baza kaj bonkvalita edukado.

---Plibonigado de ĉiuj aspektoj de la kvalito de edukado kaj certigado de la bonegeco de ĉiuj el ili, por ke ĉiuj lernantoj atingu rekonatajn kaj mezureblajn lernorezultojn, precipe rilate je legipoveco, matimatikpoveco, kaj escencaj vivolertecoj.

(El Kroniko de la UNO, junio 2007)

El “Sojle al Esperanto” de Probal Dasgupta, Prezidanto de UEA
(Rigardo al la ekvilibroserĉo ĉe UEA kaj la rolo de “adicia dulingvismo”).)

“Unuflanke la fakton ke UEA ĉiam donis prioritaton al la savtenado de la lingva kaj kultura trezoro de la homaro, jam antaŭe simbolis la serio Oriento-Okcidento; sed ekde 1996 tiu prioritato apartnas al nia labora tagordo. Aliflanke, ni ne volas kateni al tradiciportaj lingvoj tiujn homojn, kiuj volas ampleksigi la lingvan repertuaron .

Ĝuste por maksimumigi ilian liberecon ni pledas por la adicia dulingvismo, kiu baziĝas sur pedagogio aldonanta duan lingvon sen erozio de la unua. Ni agnoskas ke gravas fasoni eduksistemojn reagemajn al la konkretaj bezonoj de la publiko, precipe de tiuj popoltavoloj kies mendoj la lernejaroj emas malatenti. Tial nia LPLP [Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-Planado] ofte okupiĝas pri la edukpolitiko por malpotencaj edukatoj.”

(El “Gazetaj Komunikoj” de UEA, n-ro 312)

Kio estas “saĉa-inĉi”?

La indiĝena planto “saĉa-inĉi” ofertas diversajn avantaĝojn al la aŝaninka-gento de la centra ĝangalo de Peruo.

La aŝaninka-gento vivas je kampara izolo, sed kelkaj el ĝiaj problemoj estas tute internaciaj: Kiel pagi por kuracilo aŭ edukado kiam oni ne havas sufiĉe da mono? Kiel reteni deziritan vivomanieron kiam oni ne povas partopreni grandskalan ekonomion?

Ebla solvo de tiuj problemoj de la aŝaninka-gentanoj estas la oleo-planto “saĉa-inĉi”. La oleo de la tiu planto similas al fiŝoleoj rilate siaj efiko je homa sano. La nuna produktado de la plantoleo ne sufiĉas kompare kun la mendado kaj en Peruo kaj mondscale; jen grava oportuno.

Helpata de Oxfam kaj loka, kampara organizo, aŝaninka-gentanoj nun faras eksperimentan plantadon de la oleo-planto por ke ĝi kresku produktive kaj en avantaĝa rilato kun la aliaj kultivataj plantoj, ekzemple, oranĝoj, terpomoj, kaj sojfaboj.

Similcele, aliaj anoj de tiu gento nun produktas portosaketojn kaj tradiciajn vestojn por eksportado kaj vendado al turistoj.

La celo de la internacie direktitaj ekonomiaj agadoj de la aŝaninka-gento ne estas tuta internaciigo; male, la anoj de tiu gento celas uzi sian internacian ligojn per varoproduktado por ke ili povu protekti kaj daŭrigi sian indiĝenan kulturon.

(Ĉi tiu artikolo baziĝas je informoj provizitaj de Oxfam, internacia organizo por socia kaj ekonomia helpado, en la bulteno OXFAMExchange, vintra numero, 2009.)

Daŭrigo: Notoj pri la artikolo: “Prov-projekto pri Dulingva Edukado inter la Kam-gento en Ĝijow-provinco, Ĉinio”

D. Norman GEARY, Ĝijow-Universitato, Ĝijang, Ĝijow, Ĉinio

Yonrong PAN, Instituto de Esplorado pri Nacioj, Ĝijang, Ĝijow, Ĉinio

(La artikolo aperis en 2003 en la Gazeto de Mult-lingva kaj Mult-kultura Disvolviĝo (volumo 24, numero 4.)

Interesa kontrasto okazas koncerne la situacio de du gentoj en Ĉinio kiuj rilatas malsame al la oficiala eduko-sistemo:

Malmultaj anoj de la taj-gento sukcese partoprenis la oficialan edukosistemon pro

religiaj kialoj kaj kulturaj kutimoj, inter ili la frua geedziĝo. La rezulto de la nepartopreno fare de multaj taj-gentanoj estas ke la plimulto malakceptas la ĉinan kulturon, kvankam kelkaj taj-gentanoj akceptas ĝin kaj ĝenerale sukcesas en ĝi, sed malakceptas la kulturon, religion, kaj lingvon de sia gento.

Kontraste, anoj de la naŝi-gento ĝenerale akceptas la oficialan edukad-sistemon, do malakceptas la tradiciojn de sia gento kaj kapablas rilati sin al la ĉina ekonomio, socio, kaj kulturo. La neatendita rezulto, se oni rigardas la situacion el la vidpunkto de la ĉina registaro, estas ke naŝi-gentanoj, post kiam ili ricevis oficiale aprobitan (do, kontraw-tradician) edukadon, uzis tiun edukadon por estigi reviviĝon de aspektoj de sia tradicia kulturo sen minaci la politikan sistemon de la lando.

Komuna al la situacioj de ĉiuj tradiciaj gentoj en Ĉinio (kaj en preskaw ĉiuj landoj) estas la malfortiĝo aw almenaw adaptado de la tradicia vivmaniero pro la alveno de ŝoseoj kaj elektro. Verŝajne, la tradiciaj vilaĝoj al kiuj haveblas tiuj kontaktiloj kun la ĉina (han-a) kulturo neeviteble plintegriĝas kun tiu kulturo.

Kiel dulingva edukado influas aw povos influi la kulturan situacion inter gentoj?

(Daŭrigota.)

Arktaj Ŝanĝiĝoj

Dum 2005, pli ol 300 sciencistoj el 15 landoj faris raporton pri la arkto. Law tiu raporto, post 2040 la arkto montros la jenajn ŝanĝiĝojn:

---La kvanto de mar-mamuloj, ekzemple blankaj ursoj, balenoj, kaj fokoj, kaj ankaw marbirdoj kiuj loĝas sur marglacio, malpliigos pro glaciomanko.

---La inuita kulturo, kiu fortege kaj konoriĉe rilatas kun la arkta ekologio, ne plu ekzistos pro nepra asimiliĝo.

---Glaciomanko dum someroj signifos ke multe pli da ŝipoj atingos la nordajn havenojn por elterigi mineralojn kaj petroleon.

---Eblas ke la arkto pligraviĝos politike kaj strategie. Tio povus okazigi popol-enfluego.

La menciitaj punktoj povus kaŭzi tre fortan, iugrade neeviteblan asimilademon ĉe la indiĝenaj popoloj de la arkto, kaj postulas ke arktaj popoloj nun forte influu homojn ĉie, tiel ke ili produktos malpli da gasoj kiuj kaŭzas klimato-ŝanĝadon.

(Informoj el la artikolo "Klimato-ŝanĝiĝoj el la Arkto," Unesko-Kuriero, junio 2007. La verkanto (s-ro) Duane SMITH, estas prezidanto de la Inuita Ĉirkaw-polusa Konferenco /Kanado, kaj aktivulo rilate arktaj aferoj.)

Biografieto: Mallongaj informoj pri Kath Walker

/Uĝeru

Nunukal

3 novembro 1920 ĝis 16 septembro 1993

Kath Walker, poetino, verkistino, kaj anino de la nunukal-tribo de Aŭstralio, kreskis kaj loĝis en la lando kie ŝi naksiĝis. De sia patro ŝi heredis av lernis (av ambaw) sian justeco-percepton. Tiu percepto pelis ŝin dum la tuta vivo.

Kath Walker ne plu frekventis la lernejon post kiam ŝi 13-jaraĝis. Tuj poste, ŝi laboris kiel domservistino.

Dum la Dua Mondmilito, Kath Walker aniĝis al la aŭstrala armeo, kaj tiam sentis unuafoje socian egalecon kun aliaj aŭstralanoj. Proksimume dum 1950 ŝi aniĝis al la Komunista Partio de Aŭstralio, la sola partio tiutempe kiu malaprobis la landan politikon "Blanka Aŭstralio".

Dum la jardeko 1960-1969, Kath Walker konatiĝis kiel naciskala politikulo. Ŝiaj politikaj laboroj favoris la politikan organiziĝon kaj plejnrajtigon de la indiĝenaj popoloj de Aŭstralio. Ŝi iĝis Ŝtata Sekretario de la Kvinslanda Konsilio por la Antaŭenigo de Aŭstraliaj Indiĝenoj kaj Insulanoj de la Torres-Markolo. (Dum tiu tempo, la indiĝenoj rajtis nek voĉdoni nek partopreni la landan censon.)

S-ino Walker havis reputacion kiel antaŭeniganto de civilaj rajtoj kaj stimulantanto de intergenta kunhavado.

La unua libro de Kath Walker, Ni Iras, (anglalingve, We are Going), estis ankaw la unua libro de indiĝena verkisto aw poeto kiu eldoniĝis en Aŭstralio (1964). Dum sia periodo de politika kaj beletra famiĝo, S-ino Walker ricevis premiojn pro poezio.

Je 1970, Kath Walker ricevis la honoron "Ano de la Ordeno de la Brita Imperio," kiun ŝi redonis okaze de la festenado de la ducentjariĝo de Aŭstralio (2008), proteste ja la kondiĉoj de aŭstralaj indiĝenoj.

Je 1972, Kath Walker

/Uĝeru

Nunukal (post repreno de sia tradicia nomo) starigis la Centron Nunukal por Naturmedia Edukado kaj Kulturo, multe vizitata loko.

(Informoj el Wikipedia (angla versio) kaj Equality Media.)

Legis, pensis kaj skribis:

Jes, estimataj legantoj, iuj el vi ne nur legis, sed ankaw respondis! Sendis mesaĝojn la jenaj anoj:

(s-ino) Julie SPICKLER komentis ke kvankam Esperanto povas utili por kunligado kun la internacia komunumo, la lingvo de la lando kie oni loĝas estas la plej bezonata por ĉiutagaj sed gravegaj celoj.

(s-ro) Neil BLONSTEIN emfazis ke estas grave ke esperantistoj klare komuniku ke Esperanto ne celas mortigi landajn lingvojn.

(s-ro) Tomaso ECCARDT esprimis similan temon: Esperanto neniam uziĝu kvazaw ĝi estus la unua lingvo de iu ajn lando; tia situacio povus minaci landan lingvon.

(s-ro) David KELSO memorigis nin ke la grandaj minacoj al minoritataj lingvoj estas

la plej parolataj lingvoj, ekzemple, la angla kaj la hispana. Rilate je tiu sitacio, Esperanto estas "la sola vera alternativo".

PIP dankas al ĉiuj, kiuj komunikas siajn reagojn, opiniojn, sugestojn, kaj

Lastulo el Sia Tribo

Ŝanĝo estas la leĝo. La nova devas eksigi la malnovan.

Mi rigardas vin kaj mi estas denove en la pasinteco,

Maljuna alilokulo, soleca ĉi tie kaj perdita

Lastulo el via klano.

Retenanta nur viajn rememorojn, vi sidas

Kaj pensas pri la gaja gentanaro, la feliĉuloj,

La voĉoj kaj la ridado

Forinta, forinta ĉio,

Kaj vi restas sola.

Mi petis kaj vi permesis al mi aŭdi

La mildan, vokaloriĉan lingvon aŭdeblan

Ne plu. Por mi

Vi ludis malnovajn scenojn, malnovajn kutimojn, vi kiu uzis

Bumerangon kaj lancon.

Vi, kantinto de praaj tribokantoj,

Vi, ĉefulo unufoje de la dancofestivalo,

Vi, dufoja batalanto

Kontraw senbridaj alitribanoj transriveraj,

Jam okazinta, jam okazinta ĉio. Kaj mi sentas

Subitan larmopikadon, Vilĉjo Makenzi*

Ĉe la Ŝirmejo de la Savarmeo.

Dismetito en la propra lando

Soleca en urbaj homamasoj,

Lastulo el via tribo.

Kath Walker / Uĝeru Nunukal

(El la paĝaro de la Registaro (Ŝtata Biblioteko) de Kvinslando, Aŭstralio)

Willie Mackinzie estis purrasa aŭstrala indiĝeno, la lasta ano de la tribo darvarbada. Li mortis je 1968.

Nian Enan Verecon

“Ni bezonas ekscii tion, kio helpas nin daŭrigi nian enan verecon kaj samtempe resti malfermitaj rilate la mondo. La kialo de tio estas ke ni havus neniun valoron por aliuloj se ni simple penus imiti ilin. Oni komencas ricevi rekonon ekde la momento kiam oni kapablas oferti al la mondo ion novan; kaj tion, kion vi ofertas, oni trovas nur en la propra historio, la propra kulturo, la propra vivo-percepto”

((s-ino) Aminata TRAORE, intervuita en Malio je 2000. Tradukis al la angla Christine Oŭusu-Sarpong kaj Esi Sutherland-Addy.)

Pasioplana!

“Mi estas pasio-plena pri mia kulturo kaj ĉio, kio ampleksas kulturon. Mi kredas ke mi rajtas helpe partopreni la konstruadon de pli fortaj fondaĵoj por lingvo- bontenado. La perdon de lingvoj mi povas vidi kiel perdon de plenaj kulturoj kaj scio-sistemoj inkluzive voĉliteraturaj, kuracaj, muzikaj, kaj artaj praktikoj. Kiam oni konsideras homajn rajtojn, oni vidas la lingvoperdon kiel parto de opresiado kaj senigado de indiĝenaj popoloj rezulte de pasintaj politikoj. Ni nevole perdus nian terenon kaj niajn tradiciajn vivten-manierojn pro tio ke landaj kaj internaciaj politikoj forte trudas sin en nian mondon.”

(Verkis (s-ino) Barassa Frazer, indiĝeno de Aŭstralio, ano de la puĉ-klano, parolanto de la vik-mungkana. S-ino Frazer partoprenas la Iniciaton por Junaj Indiĝenaj Verskistoj, mentorado-programo de la Federacio por Lingvoj de Indiĝenoj de Aŭstralio kaj la Insuloj de la Torres-Markolo.

La anglalingva originalo de la citaĵo aperis en Voice of the Land (Voĉo de la Tero), septembro 2008.)

Mi Ne Estas Bovino

(La jena versio de afrika rakonto estas mallongigita per la forpreno de ripetaĵoj kiuj kaŭzis ritman efikon dum la voĉa rakontado.)

Jen rakonto pri du virinoj. Ili estis kun-edzinoj de la sama edzo. Unu el ili mortis kaj lasis sian infaneton je la zorgo de la alia edzino, malbonulino.

Ĉiutage la edzino kuiris manĝon kaj donis ĝin al siaj infanoj. Poste ŝi kuiris bovoŝaĵon kaj donis tion al la filineto de la mortinta kun-edzino. Do, dum la infanino kreskis, ŝi manĝis tiom da bovoŝaĵo ke iom post iom ŝi bovinigis.

La haŭto de la kompatinda infanino kovriĝis je bovohararo. Bovokornoj kreskis el ŝia kapo. Pro tio, ŝi foriris por serĉi sian onklinon; tiu pli aĝa fratino de la patrino havis edzon kiu estis gravulo.

La knabino ne sciis kie estis la vilaĝo kie loĝis la onklino. Ŝi nur diris al si, “Mi iras por serĉi la vilaĝon de mia pli aĝa patrino [onklino].” Ŝi marŝis kaj marŝadis ĝis kiam

Ŝi venis al puto apud ŝoseo. La homoj ĉe la puto forkuris, dirante, “Ĉu vi vidis la bovinon?”

La knabino iom muĝeme respondis “Mi ne estas bovino-o-o. Mia patrino mortis kaj lasis min kun sia kun-edzino. La kun-edzino kuiris grenon kaj donis ĝin al siaj infanoj. Ŝi kuiris bovofekaĵon kaj donis tion nur al mi. Bovokornoj kreskis el mia kapo. Kia aĉa sento! Bovoharoj kreskis el mia haŭto. Kia stranga sento! Mi iras al mia pli aĝa patrino, kiu nomiĝas Nja, ĉe la vilaĝo Gala.” La homoj ĉe la puto diris al ŝi, “Iru, kaj paco estu kun vi.”

La knabino atingis alian vilaĝon. Denove la vilaĝanoj forkuris; denove kaj senrezulte la knabino rakontis pri sia situacio. Ŝi marŝis al alia vilaĝo; tiu vilaĝo estis la loĝloko de ŝia pli aĝa patrino, la onklino, kvankam la knabino ne sciis tion. Kiam la vilaĝanoj aŭdis ŝian rakonton, ili diris al ŝi, “Paco estu kun vi, kaj kun la vilaĝo de kiu vi venis.” Sklavo inter la vilaĝanaro pensis, “Tiu stranga knabino menciis la nomon Nja; tio estas la nomo de mia posedantino.” La sklavo kaj kelkaj aliaj vilaĝanoj iris al la domo de Nja kaj diris al ŝi pri la bovin-knabino kaj ŝiaj strangaj vortoj.

La onklino iris por paroli kun la knabino. Ŝi diris, “Bovin-knabino, kiun vi serĉas?” La knabino denove diris, “Mi ne estas bovino-o-o,” kaj denove priskribis sian situacion kaj sian serĉadon por la onklino.

La onklino kuris al la knabino, ĉirkaŭbrakis ŝin, kaj ekkriis, “Jen mia nevino! Kiu aŭdacis tiel trakti ŝin?!” Vilaĝanoj venis kaj hejtis akvon. Ili forigis de la knabino la bovajn harojn kaj kornojn. Poste, la knabino vestis sin per belaj vestoj kaj iris al la domo de la onklino.

Tiu rakonto de la bambara-gento de Malio esprimas la ĉagrenon de virinoj kiu estas aw iĝos kun-edzinoj.

(Baze de traduko el angla versio fare de Sven Erelch, Hamidou Kanta, kaj Nena Ramata Sissoko.) La rakonto aperis en Women Writing Africa (Virinoj Verkas Afrikon); la volumo nomiĝas West Africa and the Sahel (Okcidenta Afriko kaj la Sahelo).

Ni neniam ĉesis

“Hodiaw, post sep generacioj, vi turnas vin al ni dum via propra kulturo malfunkcias. La tereno kiun vi ruze prenis de ni veneniĝas, kaj ne provizas al vi. Viaj riveroj, grandaj kaj malgrandaj, mortas. Mi scivolas kial vi nun turnas vin al ni. Ĉu estas ĉar malgraw ĉio, ni neniam ĉesis nian preĝadon; neniam ĉesis nian tamburadon, nian dancadon, nian kantadon al la Kreinto? Kaj ĉar vi iel ne povis silentigi nin?”

Pliaĝulo de la siuo-tribo (Sioŭ), Usono (dato neraportita).

(El The Book of Elders (La Libro de la Pliaĝuloj), Sandy Johnson, 1994)

Ĉiujn tradukojn al Esperanto faris la redaktoro.

PIP sendas nacilingvajn resumojn de La Kalumeto al diversaj universitatoj, UNO-fakoj, ne-registaritaj organizoj, kaj aliaj organizoj kiuj celas apogi indiĝenajn popolojn. Estas necese trovi personojn kiuj povas fari la resumojn en diversaj

lingvoj. Se vi povas helpi pri tio, bonvole anoncu vin!

Se vi havas artikolon, recenzon, tradukon aŭ similaĵon por aperigo en la bulteno, bonvole kontaktu:

(s-ro) Erik FELKER

ejfelker @ dslexreme.com

414 E. Cedar Ave., Apt. 11

Burbank , CA 91501

U. S. A. / Usono